

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

La Jar-kajero 2019-a de Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama

Sibayama Zyun'iti, la Redaktoro

Mi skizas la ĉefajn eventojn okazintajn en 2019.

noto: mallongigo por la kunvenejoj: [KK]: nia Kutima Kunvenejo, nome Gubernia Kunven-Centro [Kanagawa Kenmin Sentaa] en Jokohamo.



Kanagawa Kenmin Sentaa

*jan. 27 [KK] La 5-a Jarkunveno de la rondo por buĝeto, planado, estraro ktp. Ĉeestis 19 personoj kaj estis 19 mandatoj, do entute 38 voĉoj kompare al 38 plenrajtaj membroj.

*feb. 4 [ĉambro en la domo de JICA] Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havis 100-minutan prezenton pri Esperanto. Estis entute 16 ĉeestintoj.

*feb. 9 – mar. 16 [KK] Rudimenta kurso de Esperanto, gvidita de Fuse Kentarou. Aliĝis 2 kaj 1 finis la kurson.

*feb.12: Ni ricevis monoferon je 30 milionoj da enoj el anonimulo (japano, sed ne loĝanta en Jokohamo). Pri tio vidu “aŭg. 24”.

*feb. 16 [KK] Okaze de Hama-Ronda Vespero (de la 17a horo), ni havis diskutojn: (1) Kiel plu havi Hama-Rondan Vesperon. Aperis opinio, ke eventuale ni havu Hama-Rondan Tagon (de la 13a horo), (2) t.n. “Ideoŝprucadon” kiel disvastigi Esperanton.

*mar. 2 [KK] 114-a Legokunsido pri la libro “Pri arto kaj morto”, originale esperantlingvaj noveloj de Miyamoto Masao. Partoprenis 5.

*mar. 17 [KK] Hama-Ronda Vespero pri la planataj kongreslokoj. (1) Pri Vjetnamio parolis Iwaya Mituru, (2) Pri Finnlando, Sibayama Zyun'iti kaj Namba Fumiharu. Partoprenis. 16.



*apr. 1 [Parko Ŝikinomori en Jokohamo]: Ekskurso aprecanta sakur-florojn. Partoprenis 10.

*apr. 6 - maj. 18 [KK] Rudimenta kurso de Esperanto, gvidita de Fuse Kentarou. Finis la kurson 1 persono.

*apr. 6: Ni starigis Projektoteamon por plani fondi “Muzeon/Oficejon”, utiligante la monoferon, kaj komisiis s-ron Doi Hirokaz gvidi la teamon.

*apr. 20 [KK] Hama-Ronda Vespero. (1) Pri Japana Esperanto-Instituto (JEI) baldaŭ fariĝonta 100-jara, de Suzuki Keiichiro, nia membro kaj prezidanto de JEI. (2) Pri plano fondi Muzeon pri Esperanto en Jokohamo, utiligante la monoferon, de Doi Hirokaz.

*maj. 18 [KK] Hama-Ronda Vespero, kun

prelego de s-ro Sasaki Teruhiro pri la lastatempa situacio de Esperanto-movado en Ĉinio, kie li instruis kaj la japanan kaj Esperanton. Partoprenis 16.

*jun. 1 [KK] 115-a Legokunsido pri “Australia Felix”, originale esperantlingva novelaro de Trevor Steele. Partoprenis 4.

*jun. 15 [KK] Hama-Ronda Vespero. Pri Hasegawa Teru. Parolis Doi Ĉieko. Ĉeestis 21 inkluzive de nemembroj. Inter ili estis ankaŭ filino de la amikino de Teru. Tiu amikino eklernis Esperanton kaj forpelita de la lernejo kun Teru.

*jul. 27 [KK] Komuna klaso: Ĉar multaj membroj forestas for ĉe Finnlanda UK, ne-vojaĝintoj havis konversacian klason. Partoprenis 6.

*aŭg. 24 [KK] la Ekstra Jarkunveno de la rondo. Ni adoptis la planon fondi Esperantan Muzeon, utiligante la oferitan monon, starigante fonduson por tio. Kun 20 vizitintoj, 17 opini-donantojn perleteraj kaj 4 mandatoj, el 54 membroj.

★ sept. 8: Forpasis nia membro, s-ino Sasada Kyoko, 62-jara.

*sept. 9 [KK] La kunveno raporti siajn spertojn (en Esperanto). Parolis 9 el 18 partoprenintoj.



*sept. 14 [KK] 116-a Legokunsido pri “Vojaĝo de Onia”, esearo de korea esperantistino, kun plene da skizoj. Partoprenis 4.

*sept. 28, 29 [KK]: Ekspozicio ĉe Foiro de Civitanaj Agadoj. Multaj grupoj, inkluzive nin, kunvenantaj en la KK ekspozicias sian agadon.

*okt. 5 [KK] Hama-Ronda Vespero, kun prelego de ges-roj Dieter kaj Yoshie Kleemann (el Germanio), pri ilia vizito al Tanzanio. (foto 1)

*okt. 13,14 [en la urbo Saitama] Okazis la 106-a Japana Esperanto-Kongreso. (planite

ankaŭ por okt. 12, sed nuligita pro forta tajfuno). Kelkaj el niaj anoj ĉeestis, dum kelkaj rezignis iri pro la tajfuno. Nia rondo havis tablon por konigi nian rondon kaj vendi librojn eldonitajn de ni. (foto 2)

*(nov. 10 [KK]: Prelego fare de s-ro Mikaelo Bronŝtejn – nuligita pro la familia kondiĉo de la prelegonto)

*dec. 7 [KK] 117-a Legokunsido pri “La Armeo de Paluzie”, originale esperantlingva romano de Manuel de Seabra. Partoprenis 4.

*dec. 7 – jan. 25, 2020 [KK] Rudimenta kurso de Esperanto, gvidita de Fuse Kentarou. Eklernis 1 persono.

*dec. 8 [Civitana Kultura Halo en Urbo Ĉigasaki] la 49-a Zamenhof-Festo de Kanagavo, kun 29 partoprenintoj. Kun diversaj prelegoj, kantoj kaj kanto-gvidadoj, libro-prezento kaj libroservo, ktp.

*dec. 12 [ĉe la domo de s-ro Doi Hirokaz] Nia rondo oficiale ricevis librojn k.a. por la fondota muzeo. Pli ol 4000 libroj k.a. estis donacitaj al s-ro Doi de pluraj esperantistoj, por ke ili estu bone utiligitaj. Okaze de la oficialigo de la muzeo-projekto, nia rondo transricevis ilin. Ĝis la efektiva fondo, ili plu restos ĉe s-ro Doi.

(fino)



foto 1



fotita de s-ro Isii Yosiaki

foto 2

La 117-a Legokunsido

En la 7a de decembro ni havis la 117-an legokunsidon por "La Armeoj de Paluzie" de Manuel de Seabra. Partoprenis kvar personoj.

Interesa romano de banalaj popolanoj "La Armeoj de Paluzie"

Mizro Iwaya

Mi memoras ke mi legis recenzon de W.Auld antaŭ 50 jaroj. Tie li skribis ke poezia literaturo de Esperanto estas kontentiga kvante kaj kvalite, sed proza literaturo ne. Mi konsentis kun li tiam, sed nun, post 50 jaroj, mi trovas ke la situacio inversiĝis. Proza literaturo en Esperanto estas kontentiga kvante kaj kvalite. Bona ekzemplo estas tiu ĉi libro. Ĝi estas banala kaj interesa. Tiu fakto montras maturecon de esperanta literaturo.

La enhavo estas tute ordinara historio de unu riĉa hispana familio, kiu malflugas iom post iom laŭ la generacioj. Ĝi ne havas specialan temon por emfazi al ni. Mi unue intencis resumi la enhavon, sed tuj forlasis tion, ĉar ĝi estas nenio alia ol amaso da sendependaj epizodoj. Oni devas legi la tutan libron por kapti ĝian enhavon.

Mi devas menciigi ke la historio de Hispanio en la lasta jarcento ĵetis seriozan ombron en la romano. Precipe la regado de diktatora Franko ludas gravan rolon ĉi tie. La popola vivo estas serioze influata de registara ago. La historio de la familio estas samtempe historio de Hispanio kun ribeloj, kontraŭstaroj, internaj bataloj k.t.p.

Mi vidas ke homoj estas ĉiam samaj en la mondo. Konflikto inter homoj, precipe inter parencoj. Se temas pri heredo de aktivaĵoj, ĝi akriĝas plu. Ankaŭ infanoj havas konflikton inter si. Seksaj problemoj ĵetas ombron tie kaj ĉi tie. Kaj mi trovis ke Hispanio havas sian etendaĵon en amerika kontinento. Homoj povas relative facile transiri tien ĉar multaj loĝantoj tie parolas hispanan lingvon dank' al ĝia longtempa regado/aktivado tie.

Laste mi klarigas ke la titolo devenas de la ludo de infano Edmondo. La kompanio Paluzie vendis armeajn pupojn kaj Edmondo preferis ludi kun ili.

Libro duonkomprenita

AIDA Yayoi

Kiel la aŭtoro konfesis en la Kolofono de la libro, ankaŭ mi multfoje spertis alian specon de blokado. En la okazo de la aŭtoro "kreiva blokado" estis la temo, sed en mia okazo tio ne koncernis tiun konflikton, kompreneble. La aŭtoro pro "kreiva blokado" ne povis antaŭen igi sian skribadon pli ol kvindek paĝojn; li devis reverki ses fojojn kiam li atingis la paĝon. Poste lin savis Esperanto el la dilemo. Kvankam por li, poligloto, Esperanto ne estis unu sola lingvo utiligebla, sed dank' al Esperanto li povis verki ĝis la 150-a paĝo el la tuto, trioble multe ol antaŭa kvanto. Estis interese, ke li diskovris la vojon elfari tiun ĉi romanon per Esperanto post multaj provoj kaj eraroj.

La enhavo, tamen, ne interesis min, bedaŭrinde. Verdire mi ne povis kompreni pri kio la aŭtoro esprimis. La demando ofte blokis mian daŭran legadon. Kiam la rakonto venis al la duono de la volumo, mi unuafoje, sed malfrue rimarkis la strukturan karakterizaĵon, ke tiu ĉi libro ne havas konsekvencajn intrigojn sed simple kolektadis kelkajn anekdotojn. Sed eĉ la anekdotoj, miaopinie, devas havi koheran rilaton unu la alian por la legantoj plifacile kompreni la aferojn el la vidpunkto de la tuta historio. Mi ofte embarasiĝis pro malplena klarigo. Samtempe mia kapablo ne sufiĉis por sekvi la rapidan disvolviĝon de diversaj anekdotoj, kaj verŝajne pro tio mi sentis malkontenton pri la verko.

La plej impresaj partoj en la libro estis la rakontoj pri geavoj. De la geedziĝa komenco ilia vivmaniero estis unika, kaj la centra figuro de la unikeco realiĝis tra la avino. Ŝi subtenis grandan familion de dek gefiloj kun sia nevenkebla spirito. Ŝia filo Edmondo mortis pro aŭtoakcidento okazigita de sia filo, t.e. ŝia nepo, heroo de ĉi tiu libro. En la funebro la nepo enmetis siajn plej valorajn specimenojn de papilioj en la ĉerkon de Edmondo. La emocia

sceno rememorigis al mi similan sperton, en kiu mi enmetis paper-falditajn libelojn en la ĉerkon de mia mortinta amikino.

La libro traktis pri iu familia historio en la erao de la hispana milito (1936-1939), kaj la heroo ludis kun paper-soldatoj prilaborante strategiojn venki malamikojn. Sur la kovrilo staras tiuj soldatoj.

Eseo


Galerio Maruki, vizitita en la ekskurso

Sibayama Zyun'iti

Post la 106-a Japana Esperanto-Kongreso, en la 15-a de oktobro, ni 33-ope bonorde ekskursis buse al 3 vidindaj lokoj tra Gubernio Saitama, kaj unu el ili estis Galerio Maruki.

Tiu ĉi galerio estas fama pro la pentraĵoj de geedzoj Maruki, nome de s-ro Maruki Iri kaj s-ino Maruki Tosi, kiuj energie pentris la tragediajn scenojn de la atombombita urbo Hiroshima. Mi havis okazon foje rigardi ilin per foto sur ĵurnalo ktp, sed efektiva rigardo imponis min. Estas serio da verkoj, kaj unu verko ja estas foje 2 metrojn alta kaj dek metrojn larĝa, ĉefe nigra kun ruĝo por fajro. Dume la pentraĵoj de s-ino Maruki Suma, la patrino de Iri, estas kolorplenaj kaj simpatiaj

Epizode, tiu tago estis postferia tago, kaj la muzeo estis laŭkutime fermita. Tamen LKK anticipe petis, kaj speciale por ni pretis malfermi la muzeon. Atinginte tien, ni trovis la ĉefpordon fermita, kaj frapis la flankan pordon. Persono deĵoranta aperis, kaj li provis malfermi la ĉefpordon, sed vane. Li ne konis kiel fari. Tial, ni eniris tra la flanko pordo, trapasis oficejon kaj eniris en la galerion mem. Do, specialan dankon al la deĵoranto!



Nia Plano

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Sentaa, proksime de la Stacidomo Jokohama)

*jan. 26 [KK] La jarkunveno de nia rondo "NPO Esperanto Jokohama". Ni aprobos jenajn dokumentojn: la raporto pri agado kaj kaso en 2019, plano kaj buĝeto por 2020. Ĉi-foje ni esperas pli konkrete bildigi la planon fondi Esperanto-Muzeon en nia urbo.

*feb. 16 [ĉambro en la Domo de JICA] Prelego Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havos prelegon – S-ino Doi Ĉieko parolos pri Verda Majo, japanino batalinta en Ĉinio kontraŭ japana militarismo, kaj verkadis en Esperanto. Poste ni havos okazon prezenti Esperanton mem.



Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (kutime en [KK])

*Regulaj Klasoj en sabato

(1) Klaso "Eseoj", por legi "Tamen ĝi moviĝas!" gvidate de Doi Hirokaz

(2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas "La Ŝtona Urbo", originalan romanon de Anna Löwenstein, 1 fojon – libera verkado; kaj alian fojon –tradukado laŭ sia plaĉa fonto.

*Regulaj Klasoj en merkredo

(1) Klaso "Belĉielo", por legi "Silento", tradukon de la japanlingva originalo, gvidate de Doi Ĉieko

(2) Klaso "eriko", por legi "Kumeŭaŭa", gvidate de Doi Ĉieko

*Neregula Klaso

(1) Klaso "Teksantoj", por legi "Kuniberto kaj Kilevamba", per la gvido de Doi Ĉieko, du fojojn monate.

*Rapida Kurso, por legi la lernolibron "Esperanto laŭ metodo Friis", per la gvido de Doi Ĉieko, unu fojon semajne, en la Universitato de la Urbo Jokohamo.